

Christian Friedrich David Schubart,

La truto (2a traduko)

tradukita de Ludwig Schödl

ŝanĝita traduko

En riveret' malvarma,
Ja en petola ag'
Kaprica truto ĉarma
Saltetis kiel sag'.
Mi staris ĉe la bordo,
Rigardis kun plezur'
La fiŝon en akordo
Kun rivereta pur'.

Malice kun intenco
Ĉe l' bordo gvatis vir'
Kun vergo, kun fimenso
La truton kun dezir'.
Se l'akva kristaleco
Nur restos, pensis mi,
Al fiŝa libereco
Atencus vane li.

...

Sed nun senpacience
 La akvon fiŝkaptont'
 Aĉigas jen intence,
 Kaj jam el ĝia ond'
 Trompitan truton tiras.
 Kaptita, ho karul',
 La koron vi disŝiras
 Amata, vi ĉarmul'!

.....
,

,

*Traduko de la Germana poemo "Die Forelle" de CHRISTIAN FRIEDRICH DAVID SCHUBART (*1739-03-24 – †1791-10-10) en Esperanton de LUDWIG SCHÖDL (*1909-10-31 – †1997-02-20).*

Arg-832-1671 (2013-02-20 15:30:28)

Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en tiu ĉi versio iom la duan kaj trian liniojn de la 3. strofo, kompare al la teksto en la kantlibreto, kiun verkis Ludwig Schödl, pro la ĝusta rimo „fiŝkaptont' – ond“.